

## Informilo de SES (SES 通信 #177) '18 / 11 / 1

### Saluton, SES anoj!

Mi volas raporti pri la 2-a Komuna Esperanto-Kongreso de Japanio kaj Koreio en Nara. Mi partoprenis en ĝi dum la 12a ĝis la 14a de oktobro. Estis amuze interŝanĝi reciprokajn parolojn kun diversaj personoj, kaj tio povis helpi mian gravan celon. Unue en miaj celoj ni volas pligrandigi la kristanan fakan societeton en la kongreso future.

Due mi volas kontakti amikojn havantajn intereson pri la romano, Faraono, kiun mi nuntempe estas tradukanta. Precipe en ĉi tiu kongreso venis multaj koreoj, kaj mi konatiĝis kun unu juna koreo, kristana amiko, pro kies helpo mi povas disvastigi la amikojn de ambaŭ landoj. Pri la dua deziro hazarde en la tranoktejo mi renkontis unu amikon nomatan Isogai, kiu havas intereson pri Faraono, kaj nun li volas legi ĝin en sia regula kunsido. Malgraŭ nia unua renkontiĝo, mi povis paroli multe kun li bonkore. Li promesis kaj fakte sendis al mi la japanan tradukaĵon de Faraono, tradukita tridek kelke da jaroj antaŭe de s-ro Nanba Ŝoji. Kaj ĝi multe helpos mian laboron. Mi feliĉe partoprenis en la kongreso, ĉar kun dankemo tia renkontiĝo progresos mian sonĝon. (Yanagi)

**#11月3日(土、休日)の例会はありません。お休みです。**

○日韓合同エスペラント大会の参加者は 543 名、内韓国からの参加者は 76 名でした。

○エピソード: 韓国の参加者は若者が多く、エスペラントも良く出来て、ともかく賑やかで良く喋る。近鉄奈良駅周辺で陽気に盛り上がっている団体がいたので、もしかして?と思って近づく(と(やっぱり!))大会名札をぶら下げた韓国の samideanoj だった。 (Sunjo)